

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 23-an de januaro 2014 per Skype.

(Protokolo aprobita la 6-an de marto 2014.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Ulf Lunde en Os
Mario Machlik en Tromsø
Amelie Matt en Tromsø (ekde punkto 6)
Herman Ranæs en Trondheim (ĝis punkto 3)

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 5-an de decembro

La protokolo jam aprobiĝis retroŝte.

2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 43 024,- Skagen Høyrente kr 64 172,-
La formalaj rilatoj al starigo de altintereza konto ĉe la banko DNB-Nor nun estas faritaj kaj ene de kelkaj semajnoj ni espereble disponos la konton.

3. Vortara laboro

Grupo Esperantista de Trondheim jam longe laboras pri la nova norvega-Esperanta vortaro. Pro aliaj labortaskoj de la ĉefa laboranto la laboro haltis antaŭ kelkaj jaroj, sed lastatempe GET denove laboris pri la projekto. Surbaze de la spertoj pri la jama materialo la klubo ankaŭ faris novan strategion por la labormetodoj. Ankaŭ aperis nova kandidato en la klubo por la posteno kiel ĉefa laboranto, Jørgen G. Bosoni.

Kvankam temas pri GET-a projekto, NEL longe engaĝiĝis pri ĝi, la projekto estas menciita en nia laborplano, kaj NEL antaŭe petskribis por GET al Legaco Uhlen tiel ke la ĉefa laboranto povis ricevi honorarion kiu ebligis laboron ne nur dum klubkunvenoj. Surbaze de la evoluoj en Trondheim, NEL en 2014 denove petos de la Legaco monon tiucele. Jardar sendos petskribon al legaco Uhlen en la nomo de NEL kun la subskribo de Ulf. Stariĝos kontrakto inter GET kaj Bosoni laŭ modelo de similaj kontraktoj antaŭe. Oni interkonsentos kun NEL pri la partoj kiuj rilatas al NEL.

4. Tombo de Haldor Midthus

La estraro apogas, ke NEL transprenu la respondecon pri la tombo de Haldor Midthus. Ulf akiros pli da informoj pri la bezonata monsumo kaj pri la maniero de la pagado.

5. Landa Kongreso 2015

Ne aperis novaj informoj, ni daŭrigas la laboron.

6. Seminario

Ĝis nun ni havas tri eblajn temojn : 1, pri artefaritaj lingvoj, 2, kiel realigi niajn planojn?, 3, kiel kaj kial havi pli da membroj ? Se ne venos nova propono ni elektos inter ili (eble eĉ plurajn). La seminario okazos fine de oktobro per Skajpo, pli-malpli laŭ la sama maniero kiel la pasinta.

7. Jarraporto kaj jarkalkulo 2013

Mario administros la laboron pri la jarraporto.

8. Eventualajoj

A, Ni decidis sendi atentigan leteron al membroj kiuj ne pagis sian membrokotizon post ricevo de ĝirilo. Tiun leteron Anne Karin forsendos ĉirk. 2 semajnoj post la ĝirilo.

B, Agnar Fitjar jesis resti ĉefdelegito por UEA por la venontaj du jaroj.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 21:25

La venonta interkonsiliĝo okazos la 6-an de marto 2014

Raportis Mario Machlik.